
# HEJS JUNECO

FONDITA EN 1886 DE LA AVO DE ZAMENHOF



HISPANA ESPERANTA JUNULARA SEKCIO

N-RO 117 decembro 1982

HEJS

ATOCHA, 98-MADRID-12 (Hispanio)

Redaktoroj: Francisko Ksavero Moleon'
Georgo Kamaĉo

Kunlaborantoj: Anĝelo, Luis Serrano Pérez, La Blindulo, Ismael García Robledos, FKM 11/23, Sankta Nikĉjo, M.A. Sancho Pardo, Jorge Bueno Sequera, Esp-isto n-ro 2572 kaj Neĝopupo.

INDEKSO

Paĝo 3 .................... Ĉefartikolo; Laste aperis; Novaĵo pri Kontakto
" 4 .................... Konkurso de sloganoj
" 5 .................... L' orienta zodiak'
" 7 .................... Haŭtkoloro... laŭ via plaĉo
" 10 .................... Brajl-o
" 12 .................... Krucvortenigmo
" 14 .................... Sensente
" 15 .................... Matematikaĵoj!
" 16 .................... Cigno Ikso-1
" 18 .................... "1982→1983"-a poemo
" 19 .................... El la estraro
" 20 .................... Statistiko
" 21 .................... Leteroj al la Dir.; Rebuso
" 22 .................... Leteroj al la Dir.
" 23 .................... Nepre legu HEJS-Junec' !

**Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoro mem. La redaktistaro pretas lingve korekti ĉiujn kunlaboraĵojn prozajn, sed ne la versajn por ne ŝanĝi la originalajn rimon kaj ritmon.**

## ĈEFARTIKOLO

FELIĈAN NOVAN JARON!

LA REDAKCIO

## Laste aperis . . .

HEJS-JUNECO Kristnaska numero.

Tre interesa, ĉarma kaj amuza revuo por la junularo. Ja leginda estas la nova fako "Laste aperis". Pliaj informoj aperos en la pasinta numero.

### Novaĵo pri KONTAKTO

La ĉefdelegito de UEA, Juan Azcuénaga Vierna, sciigis al ni, ke KONTAKTO 1983 aperos 6-foje jare. Proksimume duono de la enhavo de ĉiu numero estos verkita en pli simpla lingvaĵo, taŭga por novaj esperantistoj. Ĝi restos plejparte ne-movada gazeto. La unua numero de la jarkolekto 1983 aperos en februaro 1983, senkonsidere, ĉu la jarkolekto 1982 estas finita aŭ ne.

Krome, ni volas sciigi al vi pri la nova adreso de Juan Azcuénaga:

Strato: General Dávila 127, portal 7,2º izda.
SANTANDER
Telefono: (942) 33 94 87
Poŝta konto: 0 3 5 4 8 5 3 1

Al kluboj kaj revuoj: bonvolu propagandi ĉi novaĵon per via bulteno aŭ simple pendigante la paperon sur vian kluban anonctabelon. Prikomentu ĝin en viaj kunvenoj. Dankon.

## konkuro de SLOGANOJ...

Organizata de Hispana Esperantista Junulara Sekcio. BAZOJ:

1. Amplekso: la slogano ne enhavu pli ol 20 vortojn.

2. Temo: propagando de Esperanto al la junularo. Helpallogo de plenkreskuloj al la junulara Esperanto-movado. Ĝenerala propagando de HEJS.

3. Lingvo: ĝi estu redaktita en Esperanto.

4. Datlimo por prezento: la 5an de marto 1983

5. Prezento: la slogano prezentiĝu tajpe aŭ preslitere sur duonfolio. Pseŭdonimo aperu sube. Aparte estu koverto kun enmetita papero informanta pri la veraj nomo kaj adreso de la aŭtoro. Sur la koverto mem estu skribita la pseŭdonimo.

6. Pluraj sloganoj devas esti aparte senditaj.

7. Juĝantaro: tripersona, elektita de la prezidanto de HEJS.

8. Premidono: dum la 7a HEJS-tendaro okazonta en la Esperanto-oazo, Gandia (valencia) Paskon 1983

Sendu al: Hispana Esperanto-Junularo, Atocha 98, Madrid 12

# L' ORIENTA ZODIAK'

En Oriento, same kiel en Okcidento, ekzistas zodiako. Ĝi konsistas, kiel ĉe ni, el dek du signoj; ili estas jenaj: rato, bovo, tigro, kato, drako, serpento, ĉevalo, kapro, simio, koko, hundo kaj porko, laŭ tiu ordo.

La zodiaka orienta ciklo dividiĝas en dek du partojn, ĉiu kun daŭro de unu jaro. Tio signifas, ke ĉiun dekduan jaron ripetiĝas nova ciklo. Tamen, la komenco de la jaro ne koincidas ekzakte kun la komenco de la signo: ĉi lasta komenciĝas en iu tago de januaro aŭ februaro. Estus tro longe transskribi ĉi tien ĉiujn datojn (vidu la suban rimarkon). En 1900 ekis ciklo, kun la rato. La aktuala ciklo havis la komencon en 1972, kaj la proksima en 1984.

La signoj havas kvin pliajn subdividojn; ili estas metalaj, akvaj, lignaj, fajraj aŭ teraj. Iu povas do esti kapro fajra, tera aŭ iu alia, depende de la naskiĝojaro. Tiuj subdividoj aperas ĉiun sesdekan jaron (ekz., en 1900 la rato estis metala, en 1912 akva, ktp., ĝis la jaro 1960, en kiu la rato estis denove metala).

Ĉiu signo havas specifajn karakterojn, sed, same kiel okazas rilate la datojn, la amplekso estus troa por ĉi revuo. Sufiĉe multaj libroj ekzistas por informiĝi, se vi havas intereson pri ĉi tiu temo.

Francisko Ksavero Moleon'

Ligna drako laŭ la orienta zodiako, sagitario laŭ la okcidenta.

Rimarko: se vi deziras koni vian signon laŭ

la orienta zodiako, skribu al mi indikante vian naskiĝdaton. Mi petas nur, ke oni aldonu la necesajn poŝtmarkojn por la respondo. Jen mia adreso:

Francisco Javier Moleón
Argentina 2, 1º - 2
MADRID - 27



# HAŬT-koloro... laŭ via PLAĈO

La malkovro estas multte pli serioza, ol ni povas imagi. Ĉu ne plaĉas al vi via blanka haŭtkoloro? Ĉu vi hontas, kiam vi rigardas viajn gambojn, kiuj aspektas kiel du laktobotelojn? Ĉu vi deziras, ke via amatino estu pli bruna, aŭ male, ke ŝi blankiĝu? Mi scias, kara amiko, ke vi estas scivolema pri tiom da demandoj. Havu paciencon, ĉar la temo meritas mensan antaŭpreparon. La trascenda revolucio, kiun alportos ĉi tiu usona malkovro (jen, vi jam scias, ke ĝi estas usona), povos skui ankoraŭ pli nian tremantan socion.

Nu, imagu, ke vi povas elekti kamaradinon, aŭ inverse, kamaradon, laŭ via kolora prefero, aŭ ankoraŭ pli, ke vi povas akiri la farbaĵojn por ke amato/ino havu alian haŭtkoloron. Momente vi pensu: vi edziĝas al virino kun ĉielblua haŭtkoloro; post du aŭ tri tagoj, aŭ du aŭ tri jaroj, ŝia koloro ne plaĉas al vi kaj vi deziras, ke ŝi fariĝu ruĝhaŭta, kaj jen, via amatino ruĝkolora. Bonvolu legi ankaŭ inverse, t.e. laŭ virina decido. Mi ja ne estas masklisto!!

Se mi estus inteligenta homo, mi povus eĉ skribi libron, sed mi jam kontentiĝas per tiu ĉi artikoleto por nia verda junularo. Mi ripetas, ke la tereno pri ĉi tiu temo estas ampleksega. Jen ekzemplo: la strando, iri al la strando por bruniĝi aŭ obskurhaŭtiĝi, estos absurdaĵo. En via hejmo, eĉ en via lito, vi povos akiri por via haŭto la koloron de vi deziratan, ĉu tiun de mediteranea maro?, ĉu tiun de "kopakabana"? Aŭ ĉu tiun palan de la nordaj eŭropaj landoj? Ne gravas, ĉio estas viadispone, viaplaĉe, viaopinie, viadezire, viaintence...

kaj multaj aliaj "viaj". La scienco malkovris ĝin, por ke vi estu feliĉa. Ni ĉiuj estos kvazaŭ kamaleonoj, kvankam ni ne vivos de la aero, kiel oni diras pri tiu besteto. Tiu problemo pri la manĝado ankoraŭ ne estas solvita, bedaŭrinde.

Ni revenu al la strando. Ofte okazas katastrofoj en tiuj "formikaj restadejoj" por somerumantaj homoj. Ofte oni utiligas tiun brunan haŭtkoloron por fanfaroni kun amikoj aŭ familianoj, jene:

-Oho, Maria, kiom bruna vi estas, minimume vi estis du monatojn ĉi tie.

-Ho! Ne, amikino Roza, mi estis tri monatojn

Feliĉe tio finiĝos, for la fanfaronuloj! Danke al tiu invento, ni ĉiuj estos feliĉaj. Ofte trompitaj, sed fine feliĉaj; kaj tio estas, kio gravas, la feliĉo. Ĉiam la feliĉo!!

Sendube baldaŭ eksplodos milito: timu nenion Mi aludas al ebla milito inter tiuj grandaj monopoloj de la kosmetiko kaj la posedantoj de la nova invento, aŭ...ĉu ili estas la samaj? Vi jam scias (la artikolo finiĝos baldaŭ, havu paciencon, sed ne antaŭlegu la finon, mi petas) kiom da sapoj, brunigaj oleoj kaj aliaj kosmetikaĵoj ekzistas, por ke la suno brunigu nin, sen bruligi nian mildan kaj delikatan haŭton. Nu, tia amaso da produktaĵoj ne plu estos bezonata. La nova kaj revolucia eltrovaĵo ilin anstataŭos. Ĉu oni povas postuli pli grandan progreson?

Estas multaj aliaj pritraktindaj temoj rilatantaj al ĉi tiu malkovro, des pli nun, kiam en nia lando jan ekzistas la divorco. Sed ne estas spaco. Se necese, kaj se iu el vi tion deziras, ni revenos al la temo.

Nu, alvenis la momento malkovri la malkovron. Jen, en Usono, kiel jam skribite, oni pretigis pilolon, kiu povas ŝanĝi la koloron de

de via haŭto. Momente, mi ripetas momente, oni celas la brunigon de la haŭto, por ke nestu necesa la vizito al la strando. La estonteco... kio okazos en la estonteco? Mi nek kuraĝas nek kapablas respondi tiun demandon.

Kara amiko, malfermu vian imagon, mi petas, kaj konstatu la socian transcendon de tiu invento. Mi ne hezitas diri, ke ĝi estas la plej granda de la nuntempa scienco. Ni ĉiuj scias, kio estas la progreso kaj tiucele kreiĝos grandiozaj entreprenoj, kiuj produktados tiun miraklan pilolon. Momente ĝi komencis anstataŭi la sunbrunigadon strandan. Baldaŭ ĝi estos uzata por ŝanĝi nian haŭtkoloron laŭ nia propra deziro. Tio jam estas io nediskutebla.

Ho ve, kiom feliĉas ni estos en ĉi tiu progresema mondo!

Jen ekzemplo: kara edzineto, kiam mi revenos vespere, mi deziras vin verdkolora (aŭ inverse, laŭ virina decido, ĉar mi ja ne estas masklisto), kaj jen mia edzino verda.

Mankas anonci la devenloko de tiu novaĵo, ĉar mi jam ne deziras altrudi por mi tiun honoron. Jen la devenloko de tiu novaĵo estas nia kredinda televido. Kredu min, tio ne estas mensogo nek invento mia.

Kun salutoj, via hodiaŭa bruna amiko

Luis Serrano Pérez

Luis Serrano Pérez

**Al la viroj plaĉas du ioj: la virinoj kaj la vin-iroj.**

**Stul Tulo**

# BRAJL-O




Louis Braille naskiĝis en Coupray (Francio) la 4-an de januaro, 1809, kaj mortis en Parizo en 1852.

Kiam li estis nur trijara, uzante la laborilojn de sia patro, li blindiĝis.

Poste li iris loĝi al instituto por blinduloj. Tie la knaboj lernis per sistemo de skribado kreita far Valentin Haüy. La literoj kaj ciferoj estis reliefe presitaj sur kartonoj, kiujn la lernantoj "legis" per la fingropintoj. Krome li eksciis pri militistara sistemo por "legi" senlume dumnokte ordonojn skribitaj reliefe sur papero. Post ol perfektigi kaj plifaciligi tiujn sistemojn, li konigis la alfabeton Brajl-o aŭ Brajl'o de li elpensitan, en la 1829-a jaro. La unua transkribita libro (1837) estas "Précis historique de France".

La alfabeto baziĝas je sespunkta rektangulo: ⠿

Jen la alfabeto:




Tiujn signojn la blinduloj devas legi perfingre. Tiuj 63 eblaj kombinaĵoj permesas al la blinduloj uzi la alfabeton kaj ĉiujn matematikajn, kemiajn kaj eĉ muzikajn signojn. Rilate la esperantan Brajl-on, la supersignoj tute ne estas problemo. Ekzistas specialaj skribmaŝinoj kaj skribiloj por blinduloj. Estas interesa la afero de la skribiloj; oni devas skribi de dekstre maldekstren, kaj skribi la signojn tiaj, kiaj oni ilin vidas en spegulo. Se ne, se vi skribus la vorton "Esperanto", la blinduloj legus la jenan "vorton" (? signifas neekzistanta signo):

?ĥ??ĵi??i

Alia ekzemplo: "Frederic" fariĝus "Ceĵifiĵd".

Fine, sciu, ke la libroj por blinduloj estas tre dikaj.Brajl-a volumo egalas ok normalajn volumojn.



# Krucvortenigmo

Horizontale

1) Poŝforma fiŝreto. Polvobrunkolora. 2) Rakedo. Demanda konjunkcio. Litero. 3) Inverse, nomo de litero. Lingvo parolata en Orienta Germanio. 4) Rilataj al legendoj. Plurala finaĵo. 5) Inverse, malgranda korno. Nedifina pronomo. 6) Ĉiu el la grupoj enhavataj de klasifiko. Rilata al unuo de termezurado. 7) Mallongigo de "vidu". Arto fari makaronojn, Makaroniko. 8) Havantaj la sekson de ino. Mikrokoko. 15-a litero de la E-a aboco. 9) Malkun. Voĉdonilkolektujo. Intejekcio. 10) Konsonanto. Adjektiva finaĵo. Inverse, praa formo de "IAM". Nomo de cifero, 11) Konjunkcio. Nomo de greka litero. Organo de la vidkapablo.


Vertikale

1) Skandinava supernatura estaĵo. Anglodevena kartludo. 2) Artefarita pafota kaj eksplodonta fairaĵo. Adverbo. Litero. 3) Numeralo. Lingvo parolata en Okcidenta Germanio. 4) Kiujn oni nepre devas legi. Simbolo de prefikso signifanta milionon. 5) Inverse, speco de trumpeto. Numeralo. 6) Regula aranĝo de aferoj. Akuta. 7) Mallongigo de "kaj". Manĝebla sekigit tubetforma faruna pasto. 8) Senvaloraj. Korta birdo. Simbolo de Kalio. 9) Malsen. Granda vazo por konservi mortocindrojn. Konjunkcio. 10) Vokalo. Alia vokalo. Inverse, akuzativa formo de "IA". Inverse, satelito (radiko). 11) Prepozicio. Adverbo. Persono, kiu ĉiam kaj ĉie estas la oka.

## Ĉu vi ne scias pri...

**La du kandeloj?**

**En kelkaj regionoj de Hindujo oni metas nomon al la infanoj, kiam tiuj atingas sian 12an tagon. La patrino elektas la nomon; sed, se la patro ne konsentas, oni lumigas du kandelojn, kiuj reprezentas la gepatrojn. Pri la nomo decidas tiu, kies kandelo estingiĝas la lasta.**



Ismael García Robledos

## Ĉu vi scias pri ...

**La bovino de s-ino O'Leary?**

**En 1781 Ĉikago estis nur urbeto el lignaj domoj. Tiam okazis, ke bovino, kiun s-ino O'Leary havis en sia stalo, faligis per hufbato petrolan lampon. Pajlo ekbrulis kaj iom poste la tuta Ĉikago brulis siavice. Ĉirkaŭ 115 000 personoj perdis sian hejmon kaj la materiaj perdoj estis pli ol 200 milionoj da doloroj.**

# SENSENTE

Mi ne havas sentojn. Mi naskiĝis sen ili. Estas neeble al sensentulo kompreni sentulan mondon. Mi ne komprenas eĉ la signifon de la vorto "sento". Kelkaj diris al mi, ke mi sendube estas feliĉa, ĉar, ne havante sentojn, mi ne maltrankvilas. Mi demandas al mi, kion signifas "feliĉo". Kiom ajn mi klopodas, mi ne povas malkovri ĝian signifon. Verŝajne, ankaŭ ĝi estas sento.

Aliaj diras: "mi volus esti kiel vi, mi volus ne havi sentojn, kaj tiel mi ne havus problemojn". Tio estas falsa: mi ja havas kaj devas solvi problemojn; ekzemple, unu plus unu faras du estas problemo. Kiuj diras tion, ke ili volas simili al mi por ne havi problemojn, pensas mallogike. Mi, kvankam ne havas sentojn, havas problemojn.

Mi konas la nomojn de kelkaj t.n. sentoj: ĝojo, tristo, amo. Ili estas sensignifaj por mi, ili estas nur kunigoj de literoj. Ĝis nun neniu provis klarigi al mi ilian signifon. Ne mirige do, ke mi ne havas sentojn, ĉar, por havi ilin, mi devus scii, kio ili estas.

Ha, mi forgesis diri al vi mian nomon: FKM 11/23. Mi estas plej moderna roboto.

FKM 11/23

# MATEMATIKAĴOJ!


Observu atente la jenan numeron: 142857
Nun, komparu; ni multiplikos ĝin:

142857 x 1 = 142857
x 2 = 285714
x 3 = 428571
x 4 = 571428
x 5 = 714285
x 6 = 857142
kaj x 7 = 999999

Stranga, ĉu ne?




$\sqrt[3]{\text{Georgo Kamaĉo.}}$




KARL (Almanaque AGROMÁN 1981)

**Bona esperantisto**
1. **neniam koleras**
2. **ne diras fivortojn**
3. **ne trinkas alkoholon**
4. **ne fumas**

**Konkludo: ne ekzistas bona esperantisto**

# CIGNO IKSO-1

Jen nova fako! Ĝi nomiĝas "Cigno Ikso-1". Ni volas aperigi per ĝi noticojn kaj mallongajn artikolojn pri scienco. Ĉu vi aŭdis paroli, ekz., pri Karonto, la satelito de Saturno, pri la futuraj veturiloj, pri atom-, sün-, vent- aŭ tajdenergio aŭ eĉ pri Cigno Ikso-1, kiu estas nigra truo? Sendu al ni mallongegan artikolon aŭ simplan kelklinian informon: bonvolu ne uzi nekutimajn fakvortojn.

## LA DEKA PLANEDO

Baziĝante sur la observado de strangaj neregulaĵoj en la orbito de la kometo Halley, la astronomoj de la Universitato de Kalifornio deduktis la ekziston de deka planedo en la sunsistemo, ankoraŭ nevidita. Laŭ iliaj kalkuloj, la nova planedo havas trioblon de la saturna volumo kaj ĝia distanco al la suno estas duoblo de la neptuna.

En novembro 1977, Ch. Kowal, astronomo de la Observejoj Hale (Usono), anoncis, ke li detektis malgrandan objekton (diametre 160-kilometran) ĉirkaŭirantan ĉirkaŭ la suno, preter la orbito de Saturno. Postaj kalkuloj indikis, ke tiu objekto, eble asteroido vaganta aŭ neaktiva kometo, plenumas unu turnon ĉirkaŭ la suno ĉiun kvindekon da jaroj, alproksimiĝante al ĝi ne pli ol 1300 milionoj da kilometroj (enirante en la saturnan orbiton) kaj malproksimiĝante ĝis proksimume 2800 milionoj da kilometroj (proksime al la urana orbito).

KIO ESTAS LA APARATO DE RUHMKORFF?

Tiu ĉi aparato konsistas el unu pilo de Bunzen, ekaktiviĝita per potasa dikromato produktanta nenian odoron. Indukta bobeno komunikas la elektron produktitan de la pilo al lanterno de speciala dispozicio; en ĉi tiu lanterno troviĝas vitra tubo, kiun oni vakuigis kaj en kiu restas nur karbongasa aŭ azota restaĵo. Kiam la aparato funkcias, ĉi gaso fariĝas luma, produktante blanketan kaj daŭran lumon. La pilo kaj la bobeno estas lokitaj en ledan sakon, kiun la vojaĝanto portas oblikve al si. La lanterno, kiu troviĝas ekstere, sufiĉe prilumas en profundaj mallumaj lokoj; ĝi permesas tute sekure riskiĝi, sen danĝero de eksplodo, tra la plej bruligeblaj gasoj, kaj ĝi ne estingiĝas eĉ meze de la plej profundaj akvoj.

S-ro Ruhmkorff estis saĝa kaj lerta fizikisto. Lia granda eltrovo estis lia indukta bobeno permesanta produkti elektron je alta tensio. Li atingis, en 1874, la 50.000-frankan kvinjaran premion, kiun Francio rezervis por la plej inĝenia aplikado de la elektro.

LA NIGRA KESTO

La fama "nigra kesto", kiun portas la pasaĝer-aviadiloj kaj kiun oni ĉiam serĉas post akcidento por determini ties kaŭzo, estas nek kesto nek nigra. Ĝi estas kompleksa magnetdrata gravurilo aŭtomate registranta en kodigita formo kvin fundamentajn informojn pri la flugo de la aviadilo, kiu portas ĝin: rapidon de la aparato, je kia alto ĝi flugas, supreniran kaj malsupreniran reĝimon (kiom da fojoj ĝi supren- aŭ malsupreniras), kiun direkton ĝi havas kaj la horon en kiu okazas tiaj registroj.

La kesto estas ronda ujo, simila al tiuj uzataj por konservi filmojn, kaj oranĝkolora, por ke oni povu distingi ĝin en lumo aŭ en mallumo.

# '1982→1983'-a POEMO

Rigardu la neĝon kovrantan la kampon,
geinfanoj ludas sur la blanka strato;
Feliĉan Kristnaskon! Feliĉan Novjaron!

Pakaĵoj kaj pupoj pendas en la arbo
dum ĉiuj aŭskultas fabelon de l'avo;
Feliĉan Kristnaskon! Feliĉan Novjaron!

Trinkante ĉampanon, manĝante nugaton,
la patro disdonas al ĉiuj donacojn;
Feliĉan Kristnaskon! Feliĉan Novjaron!

Gepatroj, gefiloj, la hundo, la kato,
ridas kaj ĝojas dum tiu festa tago;
Feliĉan Kristnaskon! Feliĉan Novjaron!

Pasos la semajnoj, pasos la monatoj,
kaj pasos la jaro. Familio kantos:
Feliĉan Kristnaskon! Feliĉan Novjaron!

Georgo Kamaĉo




JAMES (ALMANAQUE AGROMÁN 1982)

# El la Estraro

Certe vi konstatis, ke ĉi-numero atingis vin iom malfrue Mi devas konfesi, ke tio okazis pro mia kulpo ĉar la redakcio jam delonge finis la originalojn. La nura kialo estis la manko de la artikolo kiun vi nun legas. Senlaboremo tamen ne estis la kaŭzo. Mi konscie malfruigis la aperon de la revuo por vin rapide informi pri ĵus okazita estrar-delegita kunveno en Madrido.

Ĝin ĉeestis J.A. del Barrio (Valladolid), C.N. Moya (Valencio), Ana Mª Ranero (Logroño), kaj la ceteraj madridaj estraranoj. Ni pridiskutis diversajn temojn rilate la financan situacion (nuntempe, post longa penado, relative bona), la tendaron, la statut-projekton, k.t.p. La kunveno daŭris pli ol ok horoj kaj detale estis analizitaj ĉiuj temoj. Ni finredakciis statut-projekton, kiun ni sendos al ĉiuj membroj post iom da tempo. Tiam vi rajtos prezenti amendojn por fina pridiskuto en la Tendaro. Espereble post Pasko la vivo de nia Asocio estos regulita de taŭga statuto plaĉiga por ĉiuj.

Pri la Tendaro ni ĉiuj konsentis, ke ĉiuj devas plenumi parton de la laboro. Estas grava malsano en multaj Esperanto-organizaĵoj ke ĉiuj taskoj estas plenumitaj de unu sola persono. Carlos informis, ke ekzistas grandaj esperoj en Valencio atingi diversajn helpojn por la Tendaro.

Alie eble vi jam iomete priokupiĝas pro la malfruo de lasta numero de Koncize. Ĝi ne atingis vin ne ĉar ni ankoraŭ ne sendis ĝin, sed ĉar ni ne ricevis la stokon el Italio. Mi supozas, ke tiu stoko atingos nian sidejon post kelkaj tagoj.

Ni devas danki al tiuj, kiuj montris intereson pri nia laboro, kaj eĉ poŝte partoprenis ĝin. Al tiuj, kiuj nenion faris mi petas pripenson ĉar Esperanto estas ĉies afero.

Miguel A. Sanchó
HEJS-Prezidanto

Hispana Esperantista Junulara Sekcio

PROVIZORA MEMBRO-STATISTIKO

Ĝis decembro 1.982

| Autonom-komunumoj | Membroj | Subtenantoj | Totalo |
|---|---|---|---|
| Andalucio | 6 | 1 | 7 |
| Aragono | 1 | 2 | 3 |
| Asturio | 0 | 1 | 1 |
| Balearaj Insuloj | 1 | 0 | 1 |
| Ekstremaduro | 2 | 0 | 2 |
| Galicio | 1 | 0 | 1 |
| Kanariaj Insuloj | 0 | 1 | 1 |
| Kantabrio | 0 | 1 | 1 |
| Kastilio-La Manĉo | 1 | 0 | 1 |
| Kastilio-Leono | 7 | 0 | 7 |
| Katalunio | 16 | 6 | 22 |
| Madrido | 6 | 2 | 8 |
| Murcio | 2 | 0 | 2 |
| Rioño | 1 | 0 | 1 |
| Navaro | 1 | 0 | 1 |
| Valencio | 7 | 3 | 10 |
| Vaskio | 1 | 0 | 1 |
| Totalo | 53 | 16 | 69 |

# LETEROJ AL LA DIR.:

Sinjoro Direktoro:

En la numero 114 (oktobro 1981) de HEJS-Juneco, revuo, kiu tre plaĉas al mi, aperis krucvortenigmo de Anna Maria Ranero, en kiu mi trovis la jenan eraron: en la tria kaj sepa horizontalaj difinoj oni povas legi: "muzika noto"; poste, en la numero 115 (marto 1982), kiel solvo de tiuj du samaj difinoj, aperis la vorto "do".

Tio ja estas hispanismo, barbarismo ene de Esperanto.


"Do" en Esperanto estas nur konjunkcio, ne la nomo de muzika noto; la Esperanta nomo responda al tiu "do" estas "C".

Ismael García Robledos (Toledo).

⇒

## REBUSO

Kiu estas tiu libro?




(La solvo de ĉi tiu rebuso, kaj tiu de la krucvortenigmo sur la centraj paĝoj, aperos en la venonta numero.)

S-ro Dir.:

Mi skribas al ĉi tiu revuo por atentigi pri vorto ne tre klare tradukita en Esperanton el la hispana. Tiu vorto estas -pardonu min la "Sevilla"-anoj!- "Sevilla".

Kiam mi vidis la signifon de la mallongigo SEJO, mi legis: Sevilja Esperanta Junulara Organizo. Tamen, kial "Seviljo"? En PIV, sur paĝo xxxiii, sidas jena frazo: "La Barbiro de Sevilo". Kaj sur la paĝo 982: "Sevilo: Urbo en Hispanujo (6º W, 37º 23′ N)".

Eble "Sevilo" estas pli facile prononcebla. Rememoru, ke la geografiajn nomojn de PIV fiksis la "Internacia Komisiono por ordigo de la geografiaj nomoj", per la Mondmapo.

Esperantisto n-ro 2572



# NEPRE LEGU Hejs-JUNEC'!

LA PLEJ JUNA REVUO REDAKTATA DE JUNAJ KNABOJ!

Kiel vi povas atingi legi ĝin?

a) aĉetu aparte la numerojn: ĉiu el ili kostas tridek kvin pesetojn (ekz. en poŝtmarkoj).

b) per la pago de 500 pesetoj vi membriĝas kiel apoganto, kaj vi ricevas la revuojn HEJS-Juneco kaj Koncize.

c) se vi estas malpli ol 25-jara membro de HEF, tiam vi estas samtempe membro de HEJS, kaj oni sendas al vi HEJS-Juneco, Koncize kaj "Boletín".

ĉ) se vi jam atingis vian 25an jaron... vi povas elekti la eblojn a) aŭ b).

Se vi sendas monon al HEJS (vidu ties bankokonton en la numero 116, septembro 1982), sendu samtempe leteron al "HEJS, Hispana Esperantista Junulara Sekcio, Atocha 98 - 4º, Madrid 12", indikante la celon kaj daton de via pago.




**ALTA SekReTO !**

La Kontraŭspiona Servo de HEJS malkovris, ke aperis falsaj gluajoj. La Inteligentula Servo de HEJS ankoraŭ cerbumas por eltrovi, ĉu tiu "s" de "protektas" estas erara aŭ intenca.




Krome, la Spiona Servo de HEJS sciigas al ni ĉi plej novan novaĵon:
"La esperantistoj de la tuta mondo unuanime akceptas verdan stelon kiel simbolon de Esperanto".



**Ni JAM ViDAS,**

**ĉU KE LA ANONCON oni legas?**